

la verda lupeo

55

Informoj de la FIPCO-laborgrupo Esperanto
Numero 1 Majo 1962

La filatelo laŭ-tema kaj Esperanto

Preskaŭ ĉiun tagon aperas novaj poŝtmarkoj ie en la mondo.Verŝajne ne plu ekzistas kolektanto,kiu kapablas akiri ĉiujn.Jam delonge ni filatelistoj estas devigataj,fiksi limojn por nia kolektado.

Ĝenerale ni povas elekti inter du eblecoj: Ni povas kolekti aŭ ĉiujn markojn de malmultaj landoj aŭ malmultajn markojn de ĉiuj landoj.

La amaso de la kolektantoj laŭ-landaj okupas sin nur pri tre malmultaj landoj.Ni povas diri, ke ili principe agas "nacie".La filatelistoj laŭ-temaj,kiuj kolektas markojn de multaj landoj,sed malmultajn markojn de unuopa lando,kontraŭe donas la unuan rangon al la internacieco.Ĉefe ili priatentas la temon, sed nur apude la devenan landon.

En tiu punkto ili similas al la Esperantistoj. Esperanto estas la lingvo por la kontaktoj inter la nacioj.Esperanto kapabligas ĉiun personon, kontakti kun homoj, kiuj hejme uzas iu ajn fremdan lingvon.

Evidente la kolektanto laŭ-tema povas bone utiligi tiun lingvon internacian. Li havas la okazon kontakti kun Esperantistoj en la plej diversaj landoj kaj kun ilia helpo akiri filatelaĵojn neordinarajn.

Tiamaniere la filatelo laŭ-tema kaj Esperanto komune agos sur kampo internacia en tre pacema maniero.La interkomprenigo estos facila, kaj laŭ la objekto, kaj laŭ la lingvo.

Esperanto nia temo

La filatela temo Esperanto ampleksas ĉiujn filatelaĵojn oficiale eldonitajn,kiuj tekste aŭ bilde kontaktas la internacian lingvon Esperanto:

1) Poŝtmarkoj eldonitaj pro okazoj de la Esperanto-movado kaj tutaĵoj, en kiuj estas enpresitaj tiuj markoj.
2) Poŝtmarkoj kaj tutaĵoj eldonitaj pro aliaj okazoj, kun teksto en Esperanto.
3) Poŝtstampoj pro okazoj de la Esperanto-movado aŭ pro aliaj okazoj kun teksto en Esperanto.
4) Aliaj poŝtmarkoj, tutaĵoj kaj poŝtstampoj,kiuj temas pri Esperantistoj aŭ pri amikoj de Esperanto.
5) Poŝtoficialaj presaĵoj kun teksto en Esperanto.

Aŭdante ke ĝis nun aperis nur 39 Esperanto-poŝtmarkoj, oni povus opinii, ke Esperanto estas negrava filatela temo.Konsiderante ankaŭ la centojn da tutaĵoj kaj stampoj oni trovas filatelan taskon ampleksan kaj interesan.

BT 13624

La FIPCO, ĝiaj laborgrupoj kaj sekcioj

Kompilo de poŝtmarkoj kun similaj bildoj ne jam estas motivkolekto. Nur se la markoj kaj la aliaj filatelaĵoj en la albumo estas laŭ bona plano ordigitaj kaj klariga teksto estas aldonita, oni povas nomigi tion "kolektaĵo laŭ-tema".

Ekzistas kolektaĵoj modelaj kaj instruaj, sed ankaŭ aliaj kun sufiĉe malalta nivelo. Ni seriozaj filatelistoj celas, atingi kun nia kolektaĵo eble plej atentindan nivelon. Pro tio ni estas membroj de la federacio internacia pri filatelo laŭ-tema = FIPCO (Fédération Internationale de Philatélie Constructive). FIPCO subtenas nin per

spertaj konsiloj, aktualaj informoj,
klarigoj pri la diversaj temoj,
atentigo pri la koncerna literaturo,
instigo de personaj kontaktoj inter la kolektantoj,
subteno en la interŝango kaj en ekspozicioj.

FIPCO havas sekciojn laŭ-landajn kaj laborgrupojn laŭ-temajn. La sekcioj kunigas la kolektantojn de unu lando, sed pri ĉiuj temoj. La laborgrupoj nur okupiĝas pri unu certa temo, sed en ĉiuj landoj. Liston de la sekcioj kaj laborgrupoj ni publicos post kelka tempo.

La nova laborgrupo Esperanto

La motivkolektanto por sia agado bezonas fidindan katalogon, kiu enhavas ĉiun filatelan materialon pri lia temo. Kiam li posedas certan kvanton da markoj, tutaĵoj kaj stampoj, li devas pripensi, kiamaniere li dividu la temon.

Katalogo kaj ordiga divido de la temo estas plej gravaj punktoj por la laborgrupo. Ĉar en la Esperanto-movado ekzistas jam delonge unuiĝo de la kolektantoj kaj fakaj gazetoj, ni jam disponas pri listoj de markoj kaj stampoj. Tiuj unuopaj listoj devas esti reformataj kaj kompilataj al kompleta katalogo.

Markoj kun la portretoj de Esperantistoj ĝis nun ne estis registritaj sisteme. Ankaŭ pri ordigo de la temo, kiu estas necesa por motiv-filatelaĵo, oni ne povis informiĝi. Do, pluraj taskoj estas solvendaj per la nova laborgrupo.

Krom tiuj fundamentaj agoj la laborgrupo celos, konsili kaj subteni la unuopajn kolektantojn, por ke ĉiu Esperantisto kaj filatelisto havu la okazon, kompili vidindan kolektaĵon.

Ĉu vi deziras kunagi ?

Kiu interesiĝas pri la filatela temo Esperanto, ĉu komencanto aŭ ĉu sperta kolektanto, subtenu la FIPCO-laborgrupon Esperanto. Membroj de la FIPCO rajtas fariĝi membroj de la laborgrupo. Provizore la laborgrupo ne postulas propran kotizon, sed petas, ke oni aldonu duopan reafrankon aŭ du respondkuponojn al ĉiuj leteroj.

Se vi pleniĝos la aldonitan demandilon kaj sendos ĝin al la laborgrupo, vi grave helpos al la komencaj laboroj.

Bonvolu ĉiam skribi al la jena adreso:

Sinjoron Hermann Heiss
Hoellmattstr. 34
7602 Oberkirch (Baden)
Germanio okcidenta